

## Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede ...

### **la 6-an de marto ĉe François Randin**

ch. de Vallombreuse 14, Lausanne  
021 647 29 28 / 076 411 14 55



### **la 20-an de marto**

ĉe Charlotte Blanc-Maillard  
avenue Nestlé 9, 1800 Vevey  
021 922 34 74 / 079 393 32 63



### Ne forgesu aliĝi ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd#>

### kaj por la bazaro en

### Laŭzano, ĉe:


<http://doodle.com/fbzxwameyqwivvhz>

## Filosofio

Kio plej surprizas min ĉe la Okcidentuloj estas, ke ili perdas sian sanon por gajni monon, kaj ke ili perdas sian monon por trovi la sanon.

Je tro pensi pri la estonteco, ili ne plu vivas nunecon, do ili vivas nek en la nuntempo nek en la futuro. Ili do vivas, kiel se ili neniam mortos, kaj ili mortas, kiel se ili neniam vivis.

Dalai Lama



## **Laŭzana Esperanto - Societo**

Poŝtfako - Case postale 246 \* CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 21 647 29 28 \* [info@esperanto-lausanne.ch](mailto:info@esperanto-lausanne.ch)

[www.facebook.com/societedesperanto.lausanne](http://www.facebook.com/societedesperanto.lausanne)

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann \* 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard \* 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin \*

076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann \* 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier \* 021 961 38 56

## **Informilo**

Marto 2015 - n° 3

***Venu kun la problemoj viaj pri  
nia amatega lingvo ...***

***lunde, la 2-an de marto 2015 je la 20-a  
ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo ...***

***kun demandoj gramatikaj aŭ  
aliaĵoj ne bone komprenitaj.***

**Lunde la 6-an de aprilo**

*Markus prelegos ...*

**Lunde la 4-an de majo**

*Ni apartigos la diversajn aĵojn el nia ŝranko, en la bufedo, sciante, ke ni devos forigi ĝin antaŭ la fino de la jaro.*

**Sabate la 27-an de junio**

*Jara ekskurso*

*(programo en la maja informilo)*

**Julie kaj aŭguste ... somera paŭzo**

**Laŭzana Esperanto-Societo**

## Novaĵoj

**Decidoj en la jara asembleo** je la 2-a de februaro :

La jaraj kotizoj daŭrigos kiel la pasintaj jaroj : CHF 50.- por aktivaj membroj kaj CHF 30.- por pasivaj. Sed por paro ĝi estos ekde tiu jaro de CHF 80.-

La stacidoma bufedo fermos ekde la 1-a de januaro 2015 dum 2 jaroj pro gravaj renovaĵoj. Do ni devos trovi alian lokon por niaj kunsidoj. Nia sekretario proponas novan lokon ĉe "Espace Dickens", av. Charles Dickens 6, kien ni iros ekde la kunsido de septembro.

Ni devos ankoraŭ elpreni la ŝrankon, en kiu staras multe da objektoj. Ni decidis vendi tre malmultekoste tiujn aĵojn. Do la "aŭkcio" okazos dum la maja kunsido, en la kutima bufedsalono.

Ĉijare ni ĉeestos en la laŭzana bazaro por prezenti la E-lingvon. Vidu doodle... por aliĝi al la tagoj, kiam vi povos veni. Ni bezonas esti 4 personoj minimume ĉiufoje.


### **Prelego**

Karlota prelegis pri sia vojaĝo en Ĉinio, fronte al multe da partoprenantoj dum la lasta "Veillée à la maison" en Vevey. Ŝi klarigis pri sia riĉa sperto en Esperantio kaj Eo lernejo. Post tiu prelego multe da aŭskultantoj aliĝis ĉe François Randin por komenci kurson komence de marto.

### **Naskiĝo**

Niaj junaj geamikoj Sarah kaj Sylvain ne ankoraŭ anoncas la naskiĝon de sia bebo. Ni atendas la feliĉan momenton post "kelkaj horoj".

(Ni estas la 24-a de februaro 2015 je la 23-a kaj 10)



## **UK 2015 en Lillo.**

La venonta Universala Kongreso de Esperanto en Lillo, kiu okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, prezentiĝas bone. Pli ol 2000 partoprenantoj aliĝis ĝis nun, el kiuj "multaj" laŭzananoj .

## Por rideti

### **« Mekanikuracisto »**

Tio okazas en mekanika laborejo.

La mekanikisto finis remunti la cilindrojn de motoro, kiam li malantaŭe rimarkis faman kor-kirurgon, kiu atendis ion, kun brakoj krucitaj.

"Doktoro, venu vidi ion !", ekkriis la mekanikisto.

Iomete surprizita, la kuracisto alvenas apud li, tiam la mekanikisto ekstaras, viŝante siajn manojn kaj diras:

"Doktoro, ĉu vi vidas tiun motoron ? Mi ĵus malfermis ĝin, mi malmuntis ĝiajn valvojn kaj la kulason, mi riparos ĉion, kio misfunkciis. Fakte mi operaciis ĝin kormalferme. Mi fermis ĉion denove kaj nun tiu motoro funkcias kiel nova motoro.

Kiel okazas, ke mi salajre gajnas jare 25'000 eŭrojn, kiam vi mem ricevas pli ol 500'000 eŭrojn pro la sama laboro ?"

La kor-kirurgo cerbumas dum kelkaj sekundoj kaj, mokridante , respondas al la mekanikisto :

**"Provu fari same, kiam la motoro funkcias !"**



\* = \* = \* = \* = \*